

Friedrich Schiller,  
Al la printempo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Saluton, vi belulo!  
Ni bonvenigas vin.  
Per via flor-korbeto  
Vi tre ĝojigas nin.

Jen estas vi denove!  
Karega estas vi!  
Kaj ĝojas ni elkore  
Ke vin revidas ni.

Ĉu pensas vi ankoraŭ  
Pri mia amatin' ?  
Min amis la knabino,  
Ankoraŭ amas min.

De vi por la knabino  
petadis florojn mi.  
Nun ree mi vin petas.  
Kaj vi? - Ĉu donos vi?

Saluton, vi belulo!  
Ni bonvenigas vin.  
Per via flor-korbeto  
Vi tre ĝojigas nin.

...

*Traduko de la Germana poemo "An den Frühling" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 – †1805) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983-07.20.*

*MR-081-2 / Arg-310-628 (2005-05-08 14:14:10)*